

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2011 numero 2-a: marto-junio

dissendo je la 1-a de marto



Fotis Andrée Gacond la 18an de marto 2010.

Marte neĝo ofte ankoraŭ regas en nia montara regiono, tiam ni ŝatas iri admiri la alvenantan printempon ĉe la malalta Areuse-gorĝo. Tie unuajn primolojn kaj hepatikojn ni eble jam povos admiri en la ĵus elneĝigita naturo. Kelkaj kverkoj konservis aŭtunajn foliojn, sen tio nur pinoj kaj piceoj kolorigas tiun naturon ankoraŭ vintrecan. Ni ŝatas halti por trankvile aŭskulti kantojn de birdoj revenintaj al sia nesta teritorio, kaj ankaŭ el la fundo de la valo la muĝadon de Areuse, nun riverego, kiun kreskigas la fandiĝanta neĝo montara.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils
14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32

ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2011-3 : julio-oktobro :

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2011-4 : novembro-decembro :

oktobro 10, dissendo 1-an de novembro.

2012-1 : januaro-februaro :

decembre 10, dissendo fine de decembro.

2012-2 : marto-junio :

februare 10, dissendo 1-an de marto.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Mûnger, kasisto, Rue Centrale
4, 2112 Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo

2300 La Chaux-de-Fonds


Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2011-2 • Redaktis: Stefano Keller



Svisa Esperanto-Societo Jarraporto pri la jaro 2010

Membraro

SES nombras 160 membrojn je la fino de la jaro 2010. Inter tiuj 51 estas membroj de UEA. Malaperis 7 membroj pro malaliĝo aŭ ne repago de kotizo. Doktoro Arthur Baur, dumviva membro, mortis. 22 novaj membroj aliĝis, ni bonvenigas ilin. Honoraj membroj de SES estas du: Lucienne Dovat kaj Claude Gacond.

Financoj

20 personoj fariĝis patronoj de SES pagante la duoblon de la normala kotizo. Entute nun estas 7 dumvivaj membroj de SES, nova dumviva membro aperis dum 2010: temas pri nia kasisto Hans-Werner Grossmann. Mirinde alta estas la suma donacaro dum 2010: pli ol CHF 2000.- Niaj membroj estas malavaraj kaj deziras helpi al niaj aktivecoj. Ni ege dankas al ili.

Aktivecoj

La 17an de aprilo okazis *ĝenerala kunveno* de SES en Wil (SG). Partoprenis kvindek da personoj. Dum tiu asembleo ni povis danki al

Sinjoro Hans-Werner Grossmann, kiu dum pluraj jaroj elstare zorgis pri la kaso de SES. Li demisiis kaj estis anstataŭigita de S-ino Marie-Louise Münger. Posttagmeze prelegis Mireille Grosjean pri UN kaj la laboro de la UEA skipo tie.

Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj de Svisa ILEI Sekcio (SIS), *studsabatoj* okazadas en CDELI ĉiun trian sabaton de la monato. Ili estas plej bona okazo por lerni la lingvon kaj/aŭ progresi. Fidele kunvenas proksimume deko da *gesamideanoj*. Instruas tie ĉefe Monika Molnar, Luko Allemann kaj Nancy Fontannaz. SES-estraro varme dankas ilin. Komuna tagmanĝo arigas la gestudentojn kaj aliajn surlokajn esperantistojn en agrabla etoso.

Same okazadis la *kulturaj seminarioj* en CDELI, en La Chaux-de-Fonds. Prelegas Claude Gacond kaj aliaj. Vi konstatas, ke tiuj kunvenoj okazas ĉiam la unuan sabaton de la monato. SES estraro elkore dankas al Claude

Gacond pro lia elstara kaj valorega laboro en CDELI.

En CDELI ankaŭ eblas aĉeti librojn, lernolibrojn, vortarojn, k.s. CDELI estas nia *libroservo*. Ĉiun vendredon laboras en CDELI Nancy Fontannaz. Gratulon kaj dankon al ŝi. Pri CDELI bv vidi www.cdeli.org

En la jaro 2010 ni organizis *enketon* ĉe niaj membroj. La rezulto estis ricevo de 20 plenigitaj demandaroj. Kompare kun la nombro de membroj estas modesta rezulto. Fine de tiu demandaro estis loko por sugestoj, proponoj. Pri tio bv legi apartan raporton.

Informado al la ekstera mondo

Mirejo Grosjean daŭrigas sian laboron ene de Romandio. Ŝi nuntempe « nutras » 160 personojn / instancojn. Laŭbezone ŝi rapide sendas gazetaran komunikon per la Reto. Paralele, Dietrich Weidmann agadas en Alemanio. Ankaŭ la sekretario, Stefano Keller okupiĝas pri perreta gazetara informado. Laŭ propono farita dum la Ĝenerala Kunveno en aprilo 2010, en Wil, Mireille Grosjean kontaktis la alemanan televidon SF DRS por proponi partoprenon en elsendo „By de Lüt“. Ĝis nun ne venis respondo. Ekzistas kontaktoj en Tiĉino: du junuloj aperis.

Por povi pli intense informi pri Esperanto, SES kreis apartan konton *VASTE kaj DIGNE 12-128564-4*.

Pripensu kaj agu laŭ viaj ebloj!

Por vastskale informi la publikon pri la studsabatoj en CDELI, Mireille Grosjean kreis afiŝojn kaj metis ilin, respektive sendis ilin tra la kanto de Neuchâtel ĝis Delémont, Saint-Imier, do al najbaraj lokoj. Rezulto de tiu informado al publiko vidiĝas.

Alia maniero informi estas meti en la telefonlibron linion pri Esperanto. Tion oni povas fari nur en la telefonlibro de sia loĝloko. Mireille Grosjean faris tion en la telefonlibro numero 4 por la urboj Le Locle, La Chaux-de-Fonds kaj Neuchâtel kaj sia vilaĝo Les Brenets. Unu anonco kostas jare CHF 21.10. Bv pripensi pri sama agado en via regiono. Ne forgesu meti la vorton ESPERANTO en majuskloj.

Organo, interna informilo

Nia organo « SES informas » aperis kvarfoje dum la jaro kun valoraj informoj ne nur pri la vivo de la societo, sed ankaŭ kun kultura enhavo. Ni elkore dankas al la redaktoroj Claude Gacond, Richard Schneller kaj Stefano Keller, al la kontrolleganto, Nancy Fontannaz, kaj al la enkovertiganto, André Sandoz.

Retejo

La retejo de SES, prizorgata de Stefano Keller estas atingebla per : www.svisa-esperanto-societo.ch En ties redaktado Luko Allemand akceptis la taskon regule « nutri » la retejon pri okazontaĵoj. Jen tiu paĝo: www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro/ Luko laboras bonege kaj akurate. Ni ege dankas al ili.

Retlisto « svislando »

Estas je nia dispono retlisto. Per la enketo de SES pluraj personoj aliĝis al tiu retlisto. Per ĝi oni povas rapide anonci ion. Se vi deziras membriĝi, bonvolu kontakti Stefanon Keller, kiu prizorgas ĝin.

Pasporta servo

Tiu mirinda reto ekzistas nun kaj papere kaj rete. Luko Allemand fariĝis oficiala svisa peranto. En Svislando 10 personoj pretas gastigi vojaĝantojn. Bonvolu vidi la retejon: www.pasportaservo.org

Preparlaboroj

En aŭgusto 2011 nia valorega pedagogo Claude Gacond fariĝos okdekjara. Celante digne festi tion, la estraro decidis omaĝi al li dum festotago *sabate la 27an de aŭgusto 2011*, en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Programo, menuo, muziko prepariĝas. Danke al la tre fakula laboro de s-ro Reinhard Hauptenthal, aperos festolibro. SES-membroj ricevis leteron prian. Nepre notu tiun eventon en vian agendon!

Lokaj kaj fakaj grupoj

Lokaj kaj fakaj grupoj aktive kunvenadas kaj havas sian propran vivon ie kaj tie en Svislando. Por scii pri tio, kaze ke vi vojaĝadas en nia landeto, vidu nian organon « *SES informas* » kaj nian retpaĝon.

La estraro de SES tre ĝojas pri tiu bunta agado tra Svislando. Nia asocio subtenas finance iun tutnacian kunvenon, kiel ekzemple, la tre sukcesajn eventojn : *SFERO*.

Komuna muzikado sonoras foje ie, ĉiam belege. Alemano kaj Romandoj komune kantas en la *Svisa Koruso* sub la gvido de Elisabeth Demestral. Tre ĝojiga evento. Estas en Svislando pli ol dek altnivelaj muzikistoj esperantistaj.

Junularo

La kutima nomo por la junularo estas Junularo Esperantista Svislanda (JES). Ekzistas por ĝi poŝtadreso en Les Brenets, poŝtfako en Bazelo, konto ĉe UEA, konto en svisa « Postfinance » kun iom da mono... Laŭ nia scio estas grupetoj de junuloj en diversaj anguloj de nia landeto. Novuloj eklernas... La iama komitato maljuniĝas... ĉu ni baldaŭ vidos renaskiĝon de vera juna movado...

Universala Esperanto Asocio (UEA)

SES estas landa sekcio de UEA. La ligoj estas tre regulaj. Mireille Grosjean reprezentas SES-n ene de la komitato de UEA. Tamen en UK, en Kubo, somere de 2010, ŝi estis anstataŭigata de Dorothee Baumgartner. En julio 2010 Stefano Keller fariĝis estrarano de UEA, respondeca pri eksteraj rilatoj.

Estas en Svislando 19 delegitoj laŭ la Jarlibro de UEA 2010. Nia ĉefdelegito estas Francisko Randin en Lausanne.

51 personoj estas kaj membroj de SES kaj membroj de UEA. 86 personoj estas membroj de UEA kaj loĝas en Svislando. 280 personoj en Svislando havas konton ĉe UEA.

Laŭ peto de UEA, kontrolo de tiu listo estis farita de Mireille Grosjean. Ŝi bezonis la helpon de multaj personoj tra la lando - ilin ni elkore dankas. Pri UEA vidu la retejon : www.uea.org

SAT

Estas en Svislando sep membroj de SAT. Richard Schneller respondecas pri SAT en nia lando. Estas en Svislando tri membroj de SATamikaro. Mireille Grosjean respondecas pri SATamikaro en nia lando. Pri SAT kaj SATamikaro vidu : www.esperanto-sat.info

Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Ĝenevo

UN havas sian ĉefan eŭropan sidejon en Ĝenevo. Pro tio UEA bezonas surlokajn homojn por zorgi pri kontaktoj inter tiuj du instancoj, ĉar UEA estas Ne-Registara Organizo (NRO) agnoskita de UN. Nome de UEA deĵoris dum 2010 ĉefdelegito Stefano Keller kaj kvar aliaj personoj: Nicole Margot, Mirejo Grosjean, Cesco Reale kaj Charmian Common. Tiu deĵorado signifas ne nur partoprenon, sed ankaŭ preparlaboron, legadon de la retejo de UN, tradukadon kaj similajn agojn. Laŭokaze tio signifas plie verkadon de deklaro. En novembro 2010 aperis dum studsabato ĉe CDELI nia kolemino el UN (reprezentanta alian organizaĵon laborantan por lingvaj, etnaj rajtoj). Pri la aktiveco ĉe UN bonvolu vidi [\[rajtoj.org\]\(http://rajtoj.org\)](http://www.lingvaj-</p></div><div data-bbox=)

Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI / UEA

Prezidanto de ĝi estas Mirejo Grosjean, la vicprezidanto estas Monika Molnar. Kvin aliaj membroj de IEK loĝas en aliaj kontinentoj. Pri tiu komisiono bonvolu vidi : www.ilei.info


Internaciaj kontaktoj

Private multaj el niaj membroj vojaĝas al UK, al aliaj landoj. Trilanda kunveno honore al Zamenhof okazis apud Mulhouse en Francio la 11an de decembro kun kelkaj svisoj, germanoj kaj francoj. Mireille Grosjean povis konatiĝi tie kun bazelanoj kaj saluti la ĉeestantaron nome de SES. Celante tiajn internaciajn kontaktojn la estraro de SES decidis okazigi sian ĝeneralan asembleon de 2011 en Lugano, kien espereble venos ankaŭ italoj. Mireille Grosjean esploris jam pri orienta loko por kunveni kun aŭstroj kaj germanoj.

Konklude

Legante tiun raporton vi povis observi, ke multaj diversaj personoj agadas en Svislando kaj transprenas taskon, kiu rilatas al ilia kapablo, emo, eblo. Tio estas tre pozitiva fakto. La estraro de SES elkore dankas al ili ĉiuj. Tio estas signo de sana, vigla movado.

*Les Brenets, 2010-12-31
Nome de la estraro de SES :
Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann*



Protokolo de la Estrarkunsido de Svisa Esperanto-Societo, okazinta en Bielo, la 8-an de januaro 2011

Estraranoj ĉeestintaj: Mireille Grosjean, kun-prezidanto ; Dietrich Weidmann, kun-prezidanto ; Nelida Weidmann, estrarano; Stefano Keller, sekretario.

Senkulpigita: Marie-Louise Münger, kasisto.

- Prizorgado de la librotenado.

Pro neatendita operaciado de Marie-Louise Münger, Mireille Grosjean provizore transprenis la kasaferojn. Mireille ĉion trastudis, ordigis kaj - post konsultado de Hans-Werner Grossmann - pretigis la diversajn kalkulojn, raportojn financajn.

Marie-Louise Münger plurestos estrarano, sed ne povos zorgi pri la kasistaj taskoj. SES devas do serĉi alian personon por la plenumo de tiu laboro.

[*postkunsida evoluo: Hans-Werner Grossmann, nia antaŭa kasisto, akceptis repreni la laboron, sen reeniri la estraron. Grandan dankon al li!*]

- Festo de Claude Gacond, 80-jariĝa.

La festado okazos sabate, la 27-an de aŭgusto 2011, en CDELI kaj en la aŭlo de la Biblioteko de la Urbo, La Chaux-de-Fonds, kun tagmanĝo en la restoracio «Citérama», je la supro de la «Tour Espacité». *Eventualaj kontribuontoj al la programo bonvolu sin anonci ĉe Mireille Grosjean.*

Ekzemplero de la Festlibro - kiun redaktas S-ro Reinhard Haupenthal kaj eldonos Eldonejo Iltis kun subvencio de SES - estos transdonata al Claude dum tiu festo. Esperantistoj de Svislando estas invitataj partopreni en la subvenciado kiel mecenatoj, antaŭmendantoj de la eldonaĵo (alvoka letero estis dissendata).


SES aperigos por tiu tago apartan festan kajeron de *SES informas*, enhavanta pli personajn artikolojn de kelkaj ĉirkaŭantoj de Claude.

[*postkunsida evoluo: Por dimanĉo kaj lundo, por tiuj, kiuj povos kaj deziros resti, Claude Gacond oranizas plilongigon de la festado. Informoj aperos en la svisa retlisto, en SES informas, aŭ estos sendataj rekte al aliĝintoj.*]

- Diversaĵoj.

Ni traktis kelkajn teknikajn detalojn de SFERO-j, de la venonta Ĝenerala Kunveno (dum kiu okazos estrarkunsido, kadre de kio S-ro François Randin prezentos al la estraro sian laboron kiel ĉefdelegito de UEA kaj kiel peranto de kotizoj, abonoj). Fine de la kunsido okazis registrado de estraraj sonmesaĝoj por aperigo en la dua numero de *SonSESio*, *Voĉoj el Svislando*, la songazeto de SES.

Protokolis: Stefano Keller, sekretario de SES



**Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo
sabate, la 26an de marto 2011 (rememorigo)**

Hotelo Pestalozzi, Lugano

www.pestalozzi-lugano.ch

Tagordo de la Ĝenerala Kunveno de SES, 2011

14h30 - 16h00

1. Bonvenigo, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Elekto de voĉnombrantoj.
4. Evoluo de la membraro.
5. Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2010.
6. Vivo de la societo: aprobo de la estrarraporto (v. *komence de tiu ĉi bulteno*).
7. Financoj. Prezento kaj aprobo (v. *ĉi-sekve*).
8. Elekto de kaskontrolantoj.
9. Projektoj por 2011.
10. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SATamikaro, Pasporta Servo k.s. Raportontoj bv anonci sin al Mirejo Grosjean antaŭ la kunveno.
11. Buĝeto 2011. Prezento kaj aprobo (v. *ĉi-sekve*).
12. Diversaĵoj.

Pri la proponoj :

Ili devis atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets aŭ rete per mirejo.mireille@gmail.com aŭ Dietrich Weidmann ĝis la 26a de januaro 2011. Proponoj devas esti subtenataj de minimume tri personoj.

Libroservo

Dum nia jarkunveno en Lugano aĉeteblos libroj dank'al la Libroservo de CDELI. Ĝin ekspozicios kaj prizorgos Claude Gacond.

Svisa Esperanto-Societo
Jarkalkulo 2009 kaj bilanco 31.12.2009, buĝeto

1010	Poŝtkonto		5'575.32	
1011	Poŝtkonto e-deposito		32'382.65	
1060	Prunto al KCE		15'000.00	
1090	UEA konto sesa-v		109.60	
1100	Inventaro		927.00	
1150	Bonhavo antaŭimposto		99.45	
	AKTIVA SUMO		54'094.02	
2000	Transaj pasivoj		3'570.00	
2100	Kapitalo 1.1.2010: 48'145.30			
	+ pliensezoj 2010: 2'378.72 = kapitalo 31.12.2010		50'524.02	
	PASIVA SUMO		54'094.02	
		JARKALKULO	BUĜETO	BUĜETO
		2010	2010	2011
3000	Informado, varbado	2'150.90	5'000.00	5'000.00
3010	Omaĝoj, laborrimedoj	194.90	200.00	200.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	600.00	600.00	900.00
3110	SES informas elspezoj	1'880.20	3'000.00	3'000.00
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (ĜK, estraraj, regionaj)	775.10	700.00	900.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	191.90	250.00	250.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	380.40	400.00	400.00
3220	Poŝtspezoj	113.16	100.00	100.00
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00
3500	Diversaĵo		300.00	300.00
	ELSPEZA SUMO	6'736.56	11'000.00	11'500.00
4200	Membrokotizoj	5'655.00	5'000.00	5'000.00
4210	Abono al SESi sen membreco	625.00	500.00	500.00
4300	Donacoj, heredaĵoj	2'091.00	1'500.00	1'500.00
4600	Bank- kaj poŝtinterezoj	744.28	650.00	750.00
4800	Diversaĵo			
	ENSPEZA SUMO	9'115.28	7'650.00	7'750.00
	Pliensezoj jarkalkulo / Pliensezoj buĝeto	2'378.72	3'350.00	3'750.00

12.01.2010/Mireille Grosjean

Donacoj ricevitaj dum junio - decembro 2010

S-ro Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen (90) - Ges-roj Tazio kaj Teresita Carlevaro, Belinzona (100) - S-ro David Buhlmann, Prilly (60) - S-ro José Pablo Fernandes Silva, Zürich (50) - S-ro Walter Gaxer, Lausanne (35) - S-ro Eugen Hoerkens, Zürich (20) - S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20) - S-ino Jeanne Mamin, La Tour-e-Peilz (20) - S-ino Marilu Münger, Môtiers (30) - Ges-roj Rochat-Girod, Grandvaux (50) - S-ino Leonie Sennhauser, Wil (35) - S-ro Adrian Tanner, Dotzigen (20) - S-ino Marguerite Viredaz, Lausanne (15).

Entute: CHF 545.- Grandan dankon al la malavaraj subtenantoj de SES!



Enketo ene de la membraro de SES, 2010

Revenis 20 demandaroj.

SUGESTOJ, PROPONOJ

1. Kunlaboro kun ĉiaj E-organizoj
2. Pli da renkontiĝoj tutsvisaj
3. Raportoj pri UN en Ĝenevo
4. La retejo devas esti aktualigata.
5. Plibonigi la lingvan nivelon de esperantistoj. Paroligi ilin en esperanto.
6. *SES informas* bone funkcias, relativa reguleco, interesa enhavo. Sed bezonas pli da financa investo por deca prezento.
7. Diversaj kuraĝigaj esprimoj por la sukceso de SES.
8. Pli rekomendi la perkorespondan kurson kaj la studsabatojn de CDELI.
9. El Flawil: invito viziti la tiean klubon en 2011. Bedaŭrinde iliaj kunvenoj pli malofte okazos, eble 6-foje jare.

Noto pri rimarko 4:

- Pri nia oficiala retejo www.svisa-esperanto-societo.ch zorgas Stefano Keller. Luko Allemmand okupiĝas pri regula aktualigo de la rubriko « Kalendaro », tio helpas al iu, kiu deziras kunveni ie en Svislando.
- La alia retpaĝaro www.esperanto.ch apartenas al Dietrich Weidmann.

Pluraj respondintoj deklaris emon aliĝi al la retlisto « Svislando ». Do tiu rondo kreskas.

Mireille Grosjean, 2010-12-26

Venu festi kun Claude Gacond

Ĉiuj esperantistoj en Svislando, preskaŭ ĉiuj, konas Sinjoron Claude Gacond. Kelkaj el ili scias, ke en la jaro 2011, li fariĝos 80jara. Ekde jardekoj li dediĉas grandan parton de sia vivo al Esperanto. Mi ne verkis por tiu ĉi artikoleto vivrakonton lian. Mi nur volas anonci, ke SES preparas festotagon por li. Tiu celebrado okazos en

CDELI, en La Chaux-de-Fonds,
sabate la 27an de aŭgusto 2011.

Bonvolu jam nun rezervi tiun daton, mi petas.

Kun granda ĝojo revidi vin tiam (kaj antaŭe kompreneble), mi salutas vin elkore.

Vizitu la retejon de Claude Gacond: www.esperanto-gacond.ch

Mirejo Grosjean, kun-prezidanto de SES.



Al la postfestontoj

Mi ricevis vivsignojn de konatoj kaj amikoj partoprenontaj la feston, kiun SES organizas je mia honoro. Pluraj venos el foraj lokoj. Tial mi sentis la neceson organizi postfestan amikan renkonton, kiu ebligos reciprokan konatiĝon.

Tiucele mi elektis agrablan kunvenejon en la hotelo Von Bergen situanta en La Sagne, vilaĝo najbara al La Chaux-de-Fonds kie disvolviĝis la duono de mia instruista kariero. Ĉar tiu kamparana hotelo modestpreza, sed tamen tre komforta, ne estas reteje kontaktebla, estis decidite kun ĝia estrino-kuiristino, ke ĉiuj rezervadoj de litoj kaj ĉambroj kaj manĝoj disvolviĝos tra mi mem per miaj propraj retejo www.esperanto-gacond.ch kaj retadreso gacond@bluewin.ch.

Vi jam sciu, ke mi antaŭvidas por la sabato postfestan manĝon kaj amikan vesperon. Kaj dimanĉe, inter la maten- kaj tag-manĝoj eble en ĝardeno okazos interŝanĝaj kontaktoj. Kaj posttagmeze, kiuj ne tuj forvojaĝos, tiuj intimiĝos promene kun siberia pejzaĝo torfeja antaŭ ol frandi fonduon aŭ kamparanan teleron. Kaj vespere kontakto kun iama lernantino malkovrigos ŝian manieron spione filmi birdojn.

Kaj lunde, post tiu kamparana aventuro, vi trovos min en CDELI por vizito de tiu dokumentejo kaj la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Eblos akiri brokantaĵojn librajn kaj revuajn.

Precizajn informojn pri tiu postfesta programo kun la restad- kaj manĝ-kostoj baldaŭ oni legos en rubriko de mia retejo. Sed antaŭ ĉio gravas konscii, ke la

elektita hotelo havas limigitan nombron da loĝebloj kaj ke la koncernaj finaŭgustaj tagoj estas ege ŝatataj de la turistoj. Do interesatoj nepre tuj anoncu sin. Mi ilin servos laŭ la vico mem de la alveno de iliaj mesaĝoj.

Kun antaŭĝojo vin renkonti, servoprete Claude Gacond.

-oOo-

Reatentigo pri Lugano kaj pri la programo

La loko : Lugano, hotelo Pestalozzi.

Tre agrabla hotelo por nia kunveno kun salono, malmultekostaj ĉambroj kaj restoracio. Ĝi nomiĝas hotelo Pestalozzi. La restoracio ne ofertas alkoholaĵojn. La adreso de la hotelo estas Piazza Indipendenza.

Pri la hotelo bonvolu vidi www.pestalozzi-lugano.ch

Por atingi la hotelon, bonvolu uzi el la stacidomo la buson 2 en direkto de Cornaredo. Elbusiĝu aŭ en haltejo « Centro » (tria haltejo) aŭ en haltejo « Palazzo dei Congressi » (kvara haltejo). Marŝante laŭ la sama direkto kiel la buso el la haltejo « Centro », vi vidos la hotelon maldekstre.

Ni proponas al vi jenan programon :

Sabate la 26an de marto

Por tiuj, kiuj jam estos surloke sabate matene de la 10h30 ĝis la 12h30 : interparolado per rolludoj gvidata de Mirejo.

13 : 15 : komuna tagmanĝo (vidu la aldonitan menumendilon).

14h30-16h00 : Ĝenerala Asembleo de SES.

Sabate vespere je la 20h00 okazos prelego de Doktoro TAZIO CARLEVARO, psikiatro, longjara esperantisto. Li estas fakulo pri la problemoj homaj ĉirkaŭ la hazardoludoj kaj monludejoj.

Jen prezento pri lia prelego, de li mem verkita :

Kiu gajnas de hazardludo en Svislando (jura bazo).

Kriterioj de prevento interne de ludkazinaj.

Kriterioj de prevento ekster la ludkazinaj.

Rezultoj de la preventa politiko : kio pri hazardluda malsano.

Estontaj problemoj : pokero kaj interretaj vetoj kaj hazardludoj.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ estos surloke dimanĉe matene : interparolado laŭ diversaj temoj gvidata de Mirejo de la deka ĝis la dekdua horo.

Kompreneble eblos manĝi surloke sabate vespere, dimanĉe tagmeze, ktp....

Tutsvisa aktiveco

CDELI

**Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

claude.gacond@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch
stefano.keller@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn :

Marte 19,

Maje 21,

Junie 18.

Petu la detalan informilon.

Por la **Kultura Seminario**, kiun gvidas Claude Gacond, studemuloj rezervu la sekvan sabaton :

Aprile 2.

Stud-celoj de la Seminario : Unu el la studtemoj de tiu seminario estas la vortfarado en Esperanto : Ekzameno de la gramatikaj kaj vortfaradaj hezitoj de la unuaj esperantistoj (ĝenerale propraj al ĉiuj lernantoj) kaj malkovro de la sinsekvaj decidigaj kontribuoj kaj roloj de Louis de Beaufront, René de Saussure, Edmond Privat, Hector Hodler, Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Gaston Waringhien kaj fine István Szerdahelyi. Aliaj temoj ankaŭ okupos nin : legajoj, malkovro de verkistoj, respondo al primovadaj kaj prilingvaj demandoj, ktp.

-oOo-

Raporto pri la Kultura Seminario de la 5a de februaro

Kiuj interesiĝas pri la leksikologiaj demandoj propraj al la vige disvolviĝinta Esperanto, post la apero de la zamenhofa esperantigo de *Hamlet* (1894) kaj de la zamenhofaj vortaroj *Rusa-Esperanta* (1894) kaj *Esperanta-Germana* (1889), tiuj legos kun granda intereso la libron *1887 kaj la sekvo* (1980) de Gaston Waringhien (1901-1991).

Ĝis la publikigo fare de SAT de la *Plena Vortaro de Esperanto* (1930-1934), verko de la kompetenta leksikologo Emile Grosjean-Maupin (1863-1933), abundis la prilingvaj hezitoj inter la uzantoj de Esperanto koncerne al la

vortfarado. Nur malrapide oni komprenis la realan gramatikan sistemon de Esperanto, kiun karakterizas ne derivado, sed kunmetado.

La Ido-skismo de 1907 ĉefe fontas el miskompreno fare de Louis Couturat (1868-1914) kaj Louis de Beaufront (1855-1935) pri la vortfarada karakterizo de Esperanto, kiu ne efektivigis per derivado, sed per kunmetado de memstaraj vortelementoj.

Kiel demonstris en 1910 René de Saussure (1859-1943), en Esperanto la vorto **grando**, kunmeto de *grand+o* sinonimas al la vorto *grandeco*, pro la signifo mem de la vortelementoj *grand* kaj *o*, kontraŭe al Ido, kie *grando* signifas *granda homo*. En esperanto la pluralo de substantivo kaj adjektivo formiĝas per aldono de la plurala indikilo *j*: *grand+a dom+o*, *grand+a+j dom+o+j*, dum en ido la pluralo de *granda domo* fariĝas *granda domi*.

Korespondadoj cititaj de Gaston Waringhien en la ĉapitro *Kulisaj manovroj* de lia verko *1887 kaj la sekvo* malkovrigas, ke ambaŭ Louis (de Beaufront kaj Couturat) jam ekde ĉirkaŭ 1903 perletere diskutis pri reformado de Esperanto proponota al la okazonta Delegacio por alpreno de Lingvo Internacia. En aŭtuno 1907 ili sukcese trudis sian Ido-projekton. Sed la duobla rolo de Louis de Beaufront, kiu fakte estis ŝargita advokati favore al Esperanto antaŭ la Delegacio, perdigis al li ĉian aŭtoritaton en Esperantujo.

Ekde tiam li sin plene dediĉis al redaktado de *Kompleta gramatiko detaloza di la lingvo internaciona Ido* fine publikigita en Luksemburgo en 1925. Koncerne al la sekso-distingoj jen interesa citaĵo en Ido mem el la paĝo 22a de tiu verko :

« 12.- La sekso povas esar determinata nur *per sufixi* :

-**ul** por la maskuli ;

-**in** por la femini.

Exemple : **infanto, kato, finko** (sekso nedeterminita) ;

infantulo, katulo, finkulo (maskuli) ;

infantini, katini, finkini (femini) ;

la homo (sekso nedeterminita : *homa ento*) ;

la homulo (homo *maskula*) ;

la homino (homo *femina*).

patro (un del genitanti) ;

patrulo (la genitanto o patro maskula) ;

patrino (la genitanto o patro femina) qua tote darfas nomizesar **matro** ;

la patri (la genitanti qui esas o maskula o femina). Ex. : **On opinionas sempre plu generale, ke la patri dil Amerikani aborigena esis Aziani.** »

Nia celo ne estas studigi Idon, sed nur konsciigi, ke uze ĝi pli najbaras al la franca lingvo, ol al Esperanto. Tial dum Esperanto-studento lerni diri : **Mia laboro komenciĝas kaj Mi komencas mian laboron**, Ido-praktikanto simple diras : **Mea laboro komencas kaj Me komencas mea laboro** (p. 52), kiel franco : **Mon travail commence kaj Je commence mon travail**. Tiu perdo de preciza distingo inter transitiveco kaj netransitiveco kaj inter nominativo kaj

akuzativo, kaj similaj konformiĝoj al gramatikaj karakterizoj okcidenteŭropecaj, malfavoros la tutmondiĝon mem de Ido. La samon oni poste konstatos koncerne al la naturalismaj lingvo-projektoj Occidental (1922) kaj Interlingua (1952), kiuj fakte estos multe pli latinecaj, ol Ido.

Kiam Komisiono de Ligo de Nacioj en la jaroj 1922-23 okupiĝis pri Esperanto kaj Edgar von Wahl (1867-1948) proponis sia projekton Occidental, tiam la ĉino Wong Kenn (1894-1990), kies karikaturo videblas en la CDELI-salono, estis la unua, kiu atentigis, ke Esperanto funkcie similas pli al la ĉina kaj aliaj izolaj lingvoj, ol al la eŭropaj fleksiaj lingvoj. Tion ĉi redemonstros Claude Piron (1931-2008).

Inter 1910-1914, kritike al Ido, la ĝenevano René de Saussure aŭ Antido teorie komprenigis, kiel reale funkcias la vortformado en Esperanto. En sia fama konkurso pri la signifo de la vorto granda li proponis 500 orajn frankojn al tiuj, kiuj povos malpravigi lian demonstracion. Eĉ ambaŭ Louis ne povis rebati lin. Kaj baldaŭ la vort-teorion de Antido akceptos la Akademio de Esperanto.

En la venonta kultura seminario de la 2a de aprilo ni pli intimiĝos kun tiu vortfarada teorio konsiderante la pravajn kritikojn de la lingvisto István Szedahelyi (1924-1987).

La studo de la *Lingvaj respondoj* de Zamenhof certe ludis gravan historian rolon en la firmiĝo de la uzo de Esperanto, kaj ankoraŭ nun indas ekkoni per ili la prilingvajn vidpunktojn de Zamenhof. Tial parto de la seminario estis dediĉita al atenta legado de pluraj el tiuj respondoj plej ofte aperintaj en *La Revuo* eldonita de Hachette (1908-1914) responde al legantoj kaj ankaŭ nerekte reage al gramatikaj eraroj propraj al *La Internacia Lingvo* (ekapero en 1895), kies lingvaĵo ne ĉiam tre maturis.

Fakte, eĉ nuntempe, oni ofte retrovas la koncernajn erarojn en grup-bultenoj, kiel nun en Svislando en la *Limsaltanta Folio* de la Asocio Esperanto-Genève-Région. Kiel ekzemplon estis ekzamenita la artikolo titolita *Nia origino* aperinta en la ĵus dissendita *Limsaltanta Folio* 2010-4. Tiu 16-linia teksto atestas, ke nek ĝia aŭtoro, nek la bulteno-redaktoro komprenas, (1) ke subjekto lokita post netransitiva verbo ne ricevas la akuzativan markon -n, (2) ke la adjektivo *sia* ne povas troviĝi en subjekto, (3) ke komplemento ne povas esti samtempe duone akuzativa kaj duone nominativa, (4) ke tempa komplemento sen prepozicio ne povas esti en la nominativo, (5) ke la verbo esti ne havas akuzativan komplementon, (6) ke la finaĵoj -as, -is kaj -u havas precizan verban rolon, ktp.

En la unuaj jaroj de Esperanto tiaj gramatikaj eraroj estis kompreneblaj en la unuaj gazetoj. Sed hodiaŭ, en lando kie regule disvolviĝas trinivelaj esperanto-kursoj kaj kultura seminario, la apero de tiaj fuŝoj en grup-bulteno fariĝas reale kritikinda.

Claude Gacond

-oOo-



Etnismo

revuo redaktata en Svislando

INTERNACIA KOMITATO POR ETNAJ LIBERECIOJ (IKEL) tutmonde pledas por la rajtoj de la etnaj minoritatoj. Tia respekto estas justa, ĉar ĝi metas ĉiujn popolojn sur nivelon de egaleco sen privilegioj kaj rasismaj distingo, kaj ĝi estas utila, ĉar ĝi povas preventi militojn. Ĝia organo estas la revuo *Etnismo*, redaktata en Svislando kaj presata en Katalunio.

En la lasta numero de la jaro 2010 troviĝas longa artikolo pri la revido de la bolonja dialekto, kiu en 1994 preskaŭ ne plu estis parolata kaj kiu nun rimarkinde viglas kaj eĉ kontribuas al integro de enmigrintoj ankaŭ neeŭropaj, kiuj spontane vizitas kursojn por lerni la dialekton. Vi ankaŭ trovos recenzon pri la valza lingvo verkita de Wim Jansen. Vi eklernos pri deklaro de sendependiĝo far minoritata popolo en la okanivaj insuloj, kie troviĝas 74% de la usonaj militbazoj en Japanio, la rjukjuanoj. Vi legos pri la oficialeco de la okcitana lingvo en Aranvalo, Katalunio, kaj pri intervjuo de friulano en norda Italio.

La venonta numero, kiu aperos fine de marto, estos plej multe dediĉata al vojaĝo en Balkanio fare de Ursula Schnelle-Moritz kaj Uwe Moritz, interalie kun intervjuoj de la ministro pri Homaj Rajtoj en la registaro de Bosnio kaj Hercegovino kaj, en Tirana, de altranga oficisto,

direktoro de la sekcio pri minoritatoj kaj homaj rajtoj en la albana ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Kiel vi vidas, la enhavo de *Etnismo* riĉas kaj indas ĝin aboni. La abono kostas € 20 (CHF 26) kaj inkludas kotizon al **IKEL** kaj abonon al la gazeto. Por aboni: <http://ikel.stel.net> aŭ al Nicole Margot, tel: 021 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch

Nicole Margot

-oOo-

ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Svisa sekcio. Mireille Grosjean
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets
mirejo-mireille@gmail.com

Kunveno de la svisa ILEI-sekcio 18an de junio

Mi proponas al vi kunveni en La Chaux-de-Fonds en CDELI sabate la 18an de junio. Tiam okazos stud-sabato. Do venu! Ni kunvenos iel formale je la 16a horo, do kiam la studado preskaŭ finiĝas. Kompreneble vi povos partopreni la tutan studsabaton, se vi tion deziras.

Mireille Grosjean.

La neimageblaj avantaĝoj de interreto

Antaŭ unu generacio por fari, kion Mireille Grosjean povas efektivi en unu nura punkto, ni estus

bezonintaj almenaŭ du aŭ tri monatojn da leter-interŝanĝoj, kaj tre verŝajne kun malpli da sukceso.

Tion mi persone spertis en miaj interrilatoj kaj interŝanĝoj kun esperanto-instruistoj el la tuta mondo kaj en mia aktiveco por ILEI.

Kaj tre ofte ne nur la malrapido de la transporto de niaj poŝtaĵoj mal-faciligis niajn kontaktojn, sed ankaŭ la politikaj dividoj de nia tiama mondo en inter si malamikaj ŝtataroj.

Ekzemple por ke miaj urĝaj leteroj al mia regula kunlaboranto d-ro Istvan Szerdahelyi, loĝanta en Budapeŝto, fine atingu lin, ofte dis-volviĝis po pli ol duona jaro, ĉar inter ni ne nur ekzistis kelkcent-kilometra distanco, sed du burokrat-ecaj dogankontroloj. Tio ne nur ege malrapidigis la kreon de la Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA, sed ankaŭ la aktivecon mem de la interlernejaj rondoj de Grajnoj en Vento.

Ne nur la komunistaj kaj alitipaj diktaturoj paneigis niajn rilatojn. Ankaŭ en Svislando mem la politika polico sekrete agadis. Ekzemple miaj gelernantoj devis atendi dum pli ol 8 monatoj respondojn el Nepalo kaj el Jugoslavio al siaj korespondaĵoj. Fine montriĝis, ke por ilin kontroli bone salajrita berna policano estis ricevinta ordonon lerni esperanton. Sekrete tion li poste sciigis al mi, kun gratulo por nia laboro, per donaco de 500.- frankoj, parteto de la kromsalajro ricevita por spioni niajn interlernejajn korespondaĵojn. Tio estis neatendita subvencio al la entrepreno Grajnoj en Vento gvidata de Marcel Erbetta.

Post tiu rememorigo el duon-jarcenta tempo, jen ĉisekve vi legu, kion Mireille Grosjean povis atingi en unu nura nokto.

Claude Gacond

En tempo rekorda!!

Estis merkrede matene, oka horo 2011-01-19. Mi skribis al Martin Schäffer en Meksiko :

Marde vespere ni vidis, ke estus avantaĝe, se vi estus en IRE : Internacia Rajtigita Ekzamenantaro. Mi petis de vi vivrakonton, vi tuj sendis ĝin al mi. Tuj mi sendis vian vivrakonton al IEK : Internacia Ekzamena Komisiono.

Venis dum la nokto (mia nokto) jesaj respondoj el Barato (Giridhar Rao), el Ĉinio (Han Zuwu), el Burundo (Jeremie Sabijumva), Irano (Reza Torabi). Mi jesas same kompreneble. Do ĉar IEK konsistas el 7 personoj, mi jam povas anonci al vi vian elektiĝon. Gratulon!!

La du mankantaj nomoj estas tiuj de normalaj homoj, kiuj simple dormis aŭ feris aliloke for de iu komputilo.

Kiam du efikaj personoj klopodas, kiam lerta kaj aktiva Komisiono kunlaboras, oni atingas pintojn!! Mi skribis al vi : Esperanto kaj la Reto estas la du mamoj de efika tutmonda laboro. Via elekto bezonis nur 12 horojn !

Dum la mateno mi subite pensis, ke tiu esprimo "La du mamoj" rilatas al la franca lingvo kaj la franca kulturo. Do ĝi bezonas klarigon.

Duko Sully, ministro de Henriko la kvara (unua duono de la dekseca jarcento), diris :

Plugado kaj paŝtado estas la du mamoj de Francio (*Le labourage et le pâturage sont les deux mamelles de la France*).

Konsekvence okazas, ke franc-lingvanoj reprenas tian formulon. Tamen en la tuta mondo virinoj havas du mamojn, mamoj estas utila ilo, pozitiva, nutra, do iu povas tamen kompreni.

Alia ekzemplo pri Esperanto kaj la Reto : je la naŭa matene, iam antaŭ tri jaroj eble, mi eksentis la deziron legi la konstitucion de Kostariko, lando sen armeo (kompare kun la artikolo 9a de la japana konstitucio). Mi skribis al samideano en San José. Je la deka horo (60 minutojn poste) mi havis antaŭ miaj okuloj kaj en mia komputilo la konstitucion de Kostariko en la hispana, angla kaj Esperanto. Mirinde!!

Mireille Grosjean

-oOo-

Grava alvoko

Ni admiras la kuraĝon de niaj kolegoj en la tria mondo, kiuj, malgraŭ plej diversaj financaj problemoj, tamen provas agadi favore al la instruado kaj disvolviĝo de esperanto. Sed ni konsciu, ke ili vigle bezonas almenaŭ finance nian helpon. Tial ni esperas, ke la sekva alvoko ne restos sen pozitivaj konsekvencoj.

Claude Gacond.

Por la Koleghelpa Kaso

Kara ILEI-membroj,

ILEI de multaj jaroj havas Koleghelpan Kason, kiun ni uzas por membrigi instruisto-kolegojn el tiuj landoj el kiuj malfacilas aŭ maleblas transpigi monon, aŭ kie la vivnivelo ne permesas membriĝon. ILEI nun impete tutmondigas tion, do la bezono por tiu kaso forte kreskas. En 2009 ni membrigis 18 kolegojn, en 2010 ni enhejmigis per ĝi 46 personojn, kaj por 2011 ni havas almenaŭ kvindek da dezirantoj.

La Koleghelpa Kaso (KhK) permesas la pluvivon de pluraj sekcioj : Benino, Burundio, Kubo kaj Togolando. Ĝi esencas en niaj klopodoj fondi sekciojn, ekzemple en Armenio, Hinda Unio, Ĉilio, Kongo DR kaj Uzbekistano. Ĝi esencos por nia planata kampanjo nomumi reprezentantojn en novaj landoj, ekzemple Nepalo, Mongolio, Vjetnamio, Haitio, Bolivio kaj ceteraj landoj tra Latinameriko, malfermitaj al ni tra la seminario en Matanzas.

Nia problemo estas, ke la Kaso momente havas rimedojn nur por membrigi 25 personojn. La estraro traktis la temon en sia ĵusa monata skajpa kunsido. Ni elektis 25 prioritatajn subtenotojn; ni nun kontaktas la koncernatojn, ĉar kondiĉo por subteno estas ĉiujara raportado al la Ligo pri la agado. Ĝis nun membrigoj por KhK temis ĉiam pri paperaj revuoj, do je kosto de € 9 por ĉiu membro. Ni tion decidis, por protekti la paperan revuon, kiu bezonas minimuman eldonkvanton

por travivi. Plie en multaj KhK-landoj, aliro al printilo aŭ ret-konektita komputilo malfortas. Sed la estraro (kun malentuziasmo) konsentis, ke ni permesu al KhK subteni ankaŭ retajn membrojn, ĉar tio duobligos la nombron de subtenatoj. Do, kie sekcio havas kvin KhK-membrojn, ni petos al ili nomumi tri paperajn membrojn kaj du retajn.

Sekve ni alvokas al niaj membroj kaj al la sekcioj, viaj donacoj al la Koleghelpa Kaso helpas al ni membrigi ĉiujn dezirantojn, prefere per paperaj revuoj, por ke ni tiel tenu aŭ establu kontaktojn tra la mondo. En 2009 ni membrigis la 19 kubajn kolegojn, kiuj partoprenis nian konferencon (multaj el tiuj prelegis). Por la momento ni povas subteni nur kvin. Ni planis en 2010 membrigi la dekon da seminarianoj el la aliaj latinamerikaj landoj. Ial tio ne okazis, sed ni volas subteni ilin tra 2011, ĉar ili aktivigas kaj instruas kaj formas la kernon por la malfermiĝo de ILEI tra la (duon?)kontinento. Tio eblos nur pere de via subteno.

Ni akceptas senindikajn donacojn, kaj ni mem elektos la ricevonton. Kompreneble, se vi indikas la

nomon de unu aŭ pli da personoj aŭ landoj, kiujn vi volas subteni, ni respektos tion. Ni rekomendas al pli prosperaj sekcioj adopti unu el la KhK-sekcioj – efektive tio jam okazis en antaŭaj jaroj.

Viaj donacoj estas bonvenaj en nia konto ĉe UEA: ilek-a, kun klara indiko “Donaco al Koleghelpa Kaso”. Pagoj estas fareblaj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

Bonvolu informi al nia kasisto Julija Batrakova pri la pago kaj eventualaj informoj pri helpotaj personoj aŭ landoj: persiko@mail.ru

Ni kore dankas anticipe pro viaj unuopaj aŭ sekciaj kontribuoj. Kiel diris Zamenhof: *Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia.* Tio validas ankaŭ por nia Ligo!

Kore, Stefan MacGill, Julija Batrakova kaj la estraro de ILEI.

-oOo-


KCE

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Postiers 27, CP 311, 2301 La Chaux-de-Fonds

Tel. (+)032 926 74 07, / 032 926 74 12, Fakso 032 926 74 11

<kce@esperantio.net>



Raporto

La 29an de januaro disvolviĝis ĉe la Esperanto-Domo la Asembleo 2011 de Kultura Centro Esperantista. La prezidanto, Perla Martinelli, raportis pri la abunda aktivado en la jaro 2010, kiu funde engaĝis la laborfortojn de la Centro sed donis vere ĝojigajn rezultojn.

En la kultura programo aparte elstaris la Simpozio pri lingvopolitikoj en Esperantio. La lingvotesta servo bone evoluis, ankaŭ pro ekzamenaj sesioj ekster Svislando, kaj regule daŭras la instituciaj kontaktoj kun ALTE kaj la pretigo de novaj didaktikaj helpiloj (ĉefaj respondeculoj: d-ino M. Bianchi kaj d-ro G. Silber).

Ekde la 1a de julio 2009 la domflegadon (escepte de la ĝardenumado) prizorgas Fonduso Pro Esperanto, kiel regio. Jam en 2009 tio havis tre pozitivan efikon, pro multaj riparoj kaj plibonigoj: la tuta tegmento, la pargeta polurado kaj lakado en diversaj apartamentoj, la farbado kaj transformoj en kelkaj ĉambroj, en la necesejoj, en la duŝejoj, la sekurigo de la elektra sistemo ktp. En 2010 la fonduso transformiĝis al fondumo, sed la servado de FPE daŭris pli ol kontentige : kompleta kahelumo de la nepargetaj plankoj en la Ripoza kaj en la Feria apartamentoj; transformo de la altano inter la du domoj; plibonigoj en salono Klara, ktp. Sed la plej grava kaj engaĝiga transformo koncernis grandan

kelon : de plenstopita deponejo al luma konferencejo, uzebla ankaŭ por ne esperantistoj. Tio bezonis entute pli ol 20.000 svisaj frankoj da investoj. Fotoraporto aperis en *Heroldo de Esperanto* 2162.

Nun la transformoj daŭras per kompleta rearanĝo de la kuirejo flanke de salono Klara, tiel ke en somero la partoprenantoj en la kursoj povos ricevi ne nur matenmanĝon sed laŭdezire tri kompletajn manĝojn, eĉ (en aŭgusto) pretigitajn de elstara itala kuiristino !

La rutinan funkciadon de la centro garantias stabo de deĵorantoj, el kiuj kelkaj revenas al la Centro jam de pluraj jaroj.

Pliaj detaloj pri la aktivado de KCE legeblas en *Heroldo de Esperanto* 2167.

La Centro kaj ties granda libroservo estas ĉiutage je dispono de ŝatataj vizitantoj, horaro 9-12 kaj 16-19 (semajnfine nur se estas aranĝo).

Perla Martinelli

KCE programo ĝis aŭtuno 2011

(pliaj detaloj aperos ĝustatempe sur
www.esperantio.net)

21-25 aprilo 2011

Seminario pri sociologio

“Kiom aktualas la sociologioj bazitaj sur la klasbatalo?”

23-26 junio 2011

Ateliero pri beletra kreivo, principe rezervita al virinoj - kunlabore kun Feminisma Esperanta Movado. Post granda sukceso de la unua ateliero, jen ebleco denove profiti elstarajn gvidantojn !

2-7 aŭgusto 2011

Plurnivela Internacia Kursaro – por la niveloj A2, B1, B2

8 aŭgusto 2011

Lingvotesta sesio : niveloj A1, A2, B1, B2

9-14 aŭgusto 2011

Esperantologia Fakultato - niveloj C1, C2 pri literaturo, historio kaj sociologio de la esperanta popolo.

Lekcias Perla Martinelli, Bertil Nilsson, Giorgio Silfer.

15 aŭgusto 2011

Lingvotesta sesio : niveloj C1, C2

16-20 aŭgusto 2011

Dua Simpozio pri Homaranismo

publika kunveno de zamenhofologoj, partoprenas ankaŭ religiaj fakuloj.

22-26 aŭgusto 2011

Internacia Naturamika Semajno


en Grindelvaldo (Berna Alparo) kun Esperanta Naturamikaro.

Semajnfine la programo ekas je 14h30 de sabato kaj daŭras ĝis dimanĉo tagmeze. (Eblas interkonsenti por komuna tagmanĝo, se dezirate.)

La kotizo (CHF 60,-) inkluzivas programon, kafon, vespermanĝon.

Semajnaj aranĝoj daŭras de mardo ĝis dimanĉo. La kotizo (CHF 120,-) inkluzivas nur la partoprenon en la kurso. Eblas tranokti moderpreze (maksimume 42,- CHF tage/persono) kaj mendi la maten(tag)manĝojn.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

PC : 40-33714-4

Jarkotizo unuopa : Fr 25.-, paro : Fr 30.-

Venontaj kunvenoj

Marte 15 : Karnavalo (Gässle / Guggen).

Merkrede 23 : Vizito al Esperanto-kurso en Village-Neuf.

Sabate 26 : Ĝenerala Kunveno de SES en Lugano.

Aprile 28 : Ludo : Skrablo.

Maje 26 : Prelego de Hans-Peter pri "La Skoltoj" kaj kantado.

Junie 30 : Grün 80.

Julie 14 : Nacia Festo en Francio : Pikniko.

Aŭgusto 26 : Filmo.

Septembre dimanĉe 25 : Ekskurso.

Oktobre 27 : Ni parolos pri la ferioj.

Novembro 24 : Programo 2012.

Decembre sabate 10 : Zamenhofa festo en Svislando.

La jarkotizo: Fr 25.- (Paro: Fr 30)
pagendas al la konto 40-33714-4

Esperanto-Societo Basel aŭ rekte al la kasisto dum grup-kunveno.

Jarraporto 2010

Ĉiujare raporto estas okazo tra-rigardi la aktivecojn de la pasinta jaro. Jen ili :

En januaro pro malbona vetero ne povis okazi la kunveno. Februare eta grupo vizitis la Gugge-koncerton kaj la lanternojn kaj atente aŭskultis la "Schotte Clique". Monاتفine okazis nia ĝenerala jarkunveno. La martan monaton ni ludis skrblon. En aprilo ni babilis : ĉiam multo rakontindas.

Al vizito de la grupo Village-Neuf ni dediĉis la majan kunvenon kaj la junian, kiel kutime, al agrabla kunveno sur la teraso de la restoracio Grün 80.

Por partopreni la francian nacian feston de la 14^a de julio ni iris al Huningue.

La aŭgustan kunvenon ni dediĉis al babilado pri niaj ferioj. Kaj la septembra ekskurso malkovrigis al ni la belan natur-protektejon *Petite Camargue* dank'al la gvido de Anne.

En oktobro ni parolis pri la aktivadoj realigitaj dum la ferioj. Junulara renkontiĝo okazis novembre en Village-Neuf kaj

monatfine ni decidis la programon de la alproskimiĝanta jaro.

Kaj kiel kutime decembron ni renkontiĝis kadre de Zamenhofa

Festo, kiu disvolviĝis en Village-Neuf.

Jen foto de la partoprenantoj al tiu trilanda Zamenhofa Festo organizita de la grupo de Village-Neuf.



Foto el Sud-Rejna Kuriero n° 41, januaro.

Nicole Béroud prave konkludis sian raporton per la konstato, ke eĉ se ne tre grandas la bazela grupo, tamen valoras flegi la bonajn rilatojn, kiuj regas en tiu rondo

Bern

S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2,
Postfach, CH-3052 Zollikofen.

Telefona : 031 911 64 72 (kun respondilo) aŭ oficeje 031 911 23 22.

ueli.haenni@swissonline.ch

-oOo-

La Chaux-de-Fonds

Mocio pri Esperanto

La 31an de januaro la Asembleo de la Decidpova Konsilio [Conseil général] de la Komunumo La Chaux-de-Fonds akceptis mocion deponitan la 25an de novembro 2010

fare de 8 konsilianoj. Ĝi titolas *Pour une valorisation des liens entre La Chaux-de-Fonds et le mouvement espérantiste* [Por valorigo de la ligoj inter La Chaux-de-Fonds kaj la esperanto-movado].

Jen esperantigo de tiu peto al la Plenuma Estraro [Conseil communal] de la Komnumoo :

Le Conseil communal estas petita studi eblojn valorigi la ligojn, kiuj unuigas La Chaux-de-Fonds al Esperanto. Interalie ĝi estas petita, kadre de la restrukturigo de la retejo de la urbo, pripensi manieron aldoni informadon pri tiu lingvo kaj pri la movado ĝin personiganta kaj ligojn al la retejoj de tiu movado. Ĝi estas ankaŭ petita antaŭvidi, kunlabore

kun la ĉaŭdefona esperanto-parolantaro esperantigon de partoj de tiu retejo, kiel estas jam antaŭviditaj tradukoj al la germana kaj angla. Subskribintoj: Pascale Gazareth, Charles-André Favre, Francis Stäli, Katia Babey, Monique Gagnebin, Pierre-Alain Borel, Laurent Duding kaj Aline Fleury.

La deĵorantoj de CDELI, kiu jam estas esperantlingve integrita al la retejo mem de la Biblioteko de la Urbo, atentigos la Urban Estraron pri tiuj faktoj.

Mortis Fernand Donzé

La 8an de februaro mortis Fernand Donzé 88jaraĝa, la direktoro de la Biblioteko ebliginta la fondon de CDELI ekde 1956 kaj subskribinta ĝian statuton en 1967.

Nekrologa raporto pri la vivo kaj pri la kulturaj kaj politikaj aktivecoj de Fernand Donzé aperos en la venonta numero de SES informas.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15

Venonta kunveno

Marte 9 : Ĝenerala Kunveno.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel : 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

CCP : 10-26785-8

www.esperanto.ch/Lausanne

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20h00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann
Tel. 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :
Charlotte Blanc Maillard 079 393 32 63 ;
Sekretario : François Randin 076 411 14
55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88
86.

Venontaj kunvenoj

Marte 7 : Pri UN kun Mireille Grosjean.

Aprile 4 : Venu kun viaj demandoj, lingvaj problemoj... Ni provos respondi al vi. Venu kun viaj malkovraĵoj, lingvaj kuriozaĵoj... Vi prezentos ilin al ni.

Maje 2 : Pri la UK 2010 en Kubo kun Christiane Andreae.

Junie 18 : Ekskurso.

Septembre 5 : Decidota.

Oktobre 3 : Decidota.

Novembre 7 : Decidota.

Decembre 17 : Zamenhofa Festo.

-oOo-

Kultura sabato en Laŭzano

Sabate-dimanĉe, 24-25ajn de septembro 2011

Dum la « Nokto de la Muzeoj » 2010 en Laŭzano oni enkondukis vizitojn de la muzeoj en diversaj lingvoj, ĉina, rusa, hispana ktp. Ĉar tiu iniciativo sukcesis, ĝi denove okazos la 24an de septembro 2011. Hazarde mi havis la okazon proponi viziton de la geologia muzeo en Esperanto kaj mia propono estis ricevita kun entuziasmo: « Ni serĉis esperantistojn kaj ne trovis! »

La evento « Nokto de la Muzeoj » donas la eblon, per aĉeto de nekosta bileto, viziti ĉiujn muzeojn de la urbo ekde sabate kaj dum la tuta nokto. La vizito de la geologia muzeo en Esperanto okazos sabate posttagmeze. Necesas, ke la esperantistoj respondu la entuziasmon de la organizantoj kaj de la geologo, Manuel Riond por kiu tiu vizito en Esperanto gravas, kaj nefrancparolantoj estas aparte bonvenaj por doni sencon al tiu vizito en Esperanto. Mi pretigos la viziton kun la helpo de Manuel Riond, do ne temos pri traduko, sed la geologo ĉeestos la viziton, preta respondi al viaj demandoj.

Por ke plej multaj el Svislando kaj aliloke estu interesataj de tiu aranĝo, kaj por ke valoru Laŭzanen vojaĝi ni decidis organizi kulturalan sabaton ĉirkaŭ tiu vizito. Ĉi sube vi trovos provizoran programon, kiu estos precizigita en venonta numero de SESi.

Sabate, 24an de septembro

11h. Rendevuo en la ĉefa halo de la laŭzana stacidomo. Ekde tie ni kune foriros por surpriza vizito de la urbo, gvidata de Mara Bartoli.

13h. ĉirkaŭe: tagmanĝo (piknike, alportita de la partoprenantoj, aŭ en memserva restoracio).

14h. 30. Vizito de la geologia muzeo gvidata de Nicole Margot kaj Manuel Riond.

15h. 30 Eventuala (sed tute ne certa) montro de filmo pri la geologio de la lemana regiono, tradukita en Esperanto.

17h. Prelego de Daniel Schöni-Bartoli, fakulo pri svisa politiko: « Rekta demokratio en Svislando ».

19h. Komuna Vespermanĝo.

Interbabila kaj amika vespero.

Dimanĉe 25an de septembro

Al tiuj, kiuj deziras tranokti en Laŭzano, ni eble proponos ĉu turisman programon, ĉu eblan kunkantadon kun la Svisa Koruso direktita de Elisabeth de Mestral. Tio ankoraŭ difinotas.

En la venonta numero vi trovos precizigojn pri la programo kaj informojn pri la geologia kolekto de la Laŭzana Muzeo.

Nicole Margot

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel. 041 280 46 12.

Kunvenejoj

Gasthaus Adler, Gerliswilstrasse 78, 6020 Emmenbrücke. Tel. 041 281 18 38.

Gastejo **Filali**, Luzernerstrasse 6, 6020 Kriens. (Buso 1, direkto Kriens-Obernau, haltejo Linde/Pilatus) 041 320 60 86 aŭ 079 658 40 67. renata.filali@bluewin.ch

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. 041 210 25 88.

Malfondo

En la nomo de la Lucerna Esperanto-Societo (LES) ni informas vin, ke tiu societo estis oficiale malfondita je la 31a de decembro 2010. La fina Ĝenerala Kunveno okazis la 5an de februaro, kiam la malfondo estis konfirmita unuanime de ĉiuj ĉeestantaj 8 membroj, nombro kvoruma. Ne plu estas oficialaj adresoj aŭ aktivaĵoj.

En la nomo de la (iama) Lucerna Esperanto-Societo :

Paul Scherer, prezidanto kaj Sonja Brun, sekretariino

-oOo-

La Tour-de-Peilz

Svisa Muzeo de la Ludoj

Kontaktabloj kun Cesco Reale:

Telefono: 041-76-234 18 43

rete: cescoreale@gmail.com

Lude kaj samideane Cesco Reale

<http://www.museedujeu.com/>

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientvislando)

www.esperanto.ch/wil

Prezidanto: Verena Chaves-Walder,

Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071

393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere de la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Maje 4 : Lumbildprelego de Barbara Pochanke pri Transsiberia vojaĝo el Mongolio al Eŭropo.

(Ĉekomence rakonta rondo.)

Septembre 7 : Forumteatrumado.

(Ĉekomence rakonta rondo.)

Decembre 7 : Rakledvespero kun poemoj, rakontoj, kantoj.

Troveblas nia nova programo ankaŭ jene :

<http://www.fischer-zim.ch/esperanto/eok-wil/kalendaro.htm>

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum officejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1

<http://esperanto.ch/zuriko>.

La kunvenoj okazas en Centro "Karl der Grosse, Kirchgasse 14, 8001 Zürich.

Renkontiĝoj regulaj

ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en la hejmo de Michael Roesser,

Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la 20h30 (rekte apud la haltejo "Rössli-strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10 minutoj de la ĉefa stacidomo).


Informoj pri la aktuala programo de Esperanto-Societo Zuriko troviĝas en la reto sub:

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht

zuriko@esperanto.ch

<http://esperanto.ch/zuriko>

-oOo-



Kongresen

Dum la vintra sezono Luko Allemand kontentiĝas kuŝbicikli en sia apartamento



Monda Socia Forumo en Dakaro

Mireille Grosjean ĉeestis la Mondan Socian Forumon en Dakaro, Senegalio. Jen kiel ŝi raportas pri siaj poresperanta laboro, kontaktoj kaj impresoj :

Mi partoprenis tiun eventon inter la 6a kaj la 11a de februaro 2011 en sufiĉe freŝa temperaturo : mi surhavis somerajn vestaĵojn, sed afrikanoj surhavis dikajn mantelojn kaj lanajn kapkovrilojn. Suno brilis kaj vento blovis : ni devis meti ŝtonojn sur niajn informilojn.

Mi alvenis al Dakaro kun proksimume 14 kg da paperaĵoj.

Mi deĵoris en UEA-budo kun 4 samideanoj el Senegalio, do efika kunlaboro povis okazi. Vasta publiko vidis nian budon, niajn flagojn, nian banderolon, kiun mi pentris verde post tranĉado de blanka littuko.

Aŭ vizitantoj venis al la budo por starigi demandojn kaj ricevi informilojn, aŭ ni iris tra la homamaso kaj disdonis informilojn al la marŝantaj vizitantoj.

Paralele ni povis inter ni kvin konatiĝi kaj esplori pri la funkciado de la movado en Senegalio, en Afriko, en la mondo. Interŝanĝi informojn, spertojn, klarigojn. Tre fruktodonaj tagoj.

Poste mi restadis dum du tagoj en Thiès kaj ripozis ĉe kolego pcedukisto. Mi ĝuis la palabrojn kun li sidante sub mangoarbo.

Dum miaj tagoj en Senegalio mi « banis » en la sonoj de la ŭolofa lingvo, same kiel oni « banas » en la dialekto en Alemanio. Konstanta uzo de du lingvoj (diglosio).

Mireille Grosjean

<http://mirejo3.blogspot.com/2011/02/dakar.html>

-oOo-

Alia informo el Dakaro

Kiel enkonduko al la Monda Sociala Forumo en Dakaro, kie grupo da mondĉivitanoj ĉeestas, la Kampara Komunumo GANDIOL (Senegalio) ĵus deklaris sin « Monda Teritorio ligita al la Monda Komunumo ». La Kampara Komunumo Gandiol entenas 37 vilaĝojn kaj 20.000 enloĝantojn. Ĝi estas la 979a Mondĉivitana teritorio.

La « tutmondiĝa » movado de teritorioj komenciĝis en julio 1949 laŭ iniciato de la urbo Cahors (Lot, Francio).

<http://www.recim.org/dem/conseil-eo.htm>

-oOo-


Redaktas: Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel,
rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Alfred Gloor kaj Esperanto

La postlasaĵo de la grafikisto kaj pentristo en CDELI.

(rs) En la jaro 2005 la nevino de la artisto, Elisabeth Burri loĝante en Zumikon, serĉis konvenan depon-ejon por la postlasitaj verkoj de Alfred Gloor (1892-1978). Ĉar en la ciklo de gravuraĵoj *Kajeno* estas videblaj surskriboj en esperanto, ŝi informiĝis en CDELI pri ebleco por depono de la verkoj de Alfred Gloor, kiujn ŝi posedis.



Alfred Gloor en januaro 1978.


Claude Gacond entuziasmiĝis pri la verkaro de Alfred Gloor kaj aĉetis plurajn gravuraĵojn. En 2006 sinjorino Burri donacis la ceterajn gravuraĵojn, akvarelojn kaj skizojn al CDELI. La raporto de la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds notis tiun valoran akiraĵon menciante la serion *Kajeno* kaj la okdek kvin akvarelojn kiuj ilustras la verkon *Urax und Rezabell* de Marcel Dornier (1893-1988, artisto kaj verkisto). Ankaŭ la direktoro de la artmuzeo en La Chaux-de-Fonds montriĝis interesita kaj opiniis ke valorus fari ekspozicion post la arkivado.

Biografiaj notoj

Alfred Gloor naskiĝis la 9an de marto 1892 en Berno kiel filo de la gimnazia instruisto Alexander Adolf Gloor (1861-1942) kaj de Elise Rosine Hefti (1864-1931). Li komencis sian profesian vivon kiel desegnisto ĉe la Federacia Topografia Instituto en Berno, sed tuj post la akiro de la metidiplomo li decidis iĝi pentristo. Sekvis artstudoj kaj plispertiĝo en la franca lingvo en Ĝenevo en 1914. La sekvan jaron li transloĝiĝis al Parizo, kie li studis en

pentrista akademio ĉe la tiĉinano Nicolas Rossi. De 1915 ĝis 1974 li vivis sesdek jarojn en Parizo, kun interrompo de kelkaj vojaĝoj kaj

pluraj restadoj en Svisio, kie li realigis freskojn kaj vitralojn por privataj kaj publikaj konstruaĵoj.



Kajeno VII : Ili ne mortis
(maldekstre supre : ESTONTO, dekstre sube : PACO)

La gravuristo

Alfred Gloor dediĉis sin en la unua periodo de sia vivo al gravuraĵoj nigra-blankaj kaj atingis majstrecon en tiu tekniko per la ciklo *Kajeno*, « mortodanco » akuzanta la kruelaĵojn de la milito, la naciismon kaj la moralan respondecon de la instigantoj. La stilo proksimiĝas al ekspresionismo kaj la titolbildo intence impresas repuŝe. Ĝi estis inspirita de la Unua mondmilito, sed ankaŭ de personaj spertoj seniluzi-


igaj en la svisa armeo, el kiu li estis eksigita kiel kaporalo.

La titolo *Kajeno* probable estas vortludo inter la Kaino de la Biblio kaj la franca punkolonio Kajeno. Tiu serio de dekkvin gravuraĵoj havas subskribojn en esperanto sur aparta enhavlisto. Sur pluraj gravuraĵoj oni povas trovi esperantajn vortojn : *estonto, ni – la ĉiaj, patrujo, venko, gloro, paco, triumfo finala*.

Ankaŭ la enkonduka teksto estas en esperanto:

« *Kajeno* ne nur celas kulpigi militfarantojn, sed ĉefe la grandan paceman sed nescieman popolamason, kiu post ia ordono sin lasas ŝanĝi en « mortigan vivantan maŝinon » forlasante mem malkuraĝege ĉian homan indecon. »

Post la partopreno per sep gravuraĵoj el la serio *Kajeno* dum la Nacia artekspozicio en Zuriko en la jaro 1925 (la unusola partopreno de Gloor al ekspozicio en sia tuta vivo), li dediĉis sin al kolorpentraĵoj.



Urax kaj Rezabell

La pentristo

Alfred Gloor interesiĝis pri literaturo kaj estis influita de la verkoj de Carl Spitteler (1845-1924, Nobel-premiito kaj Schiller-premiito en 1920). Speciale la verkoj *Prometheus und Epimetheus* (Prometeo kaj Epimeteo) kaj *Olympischer Frühling* (Olimpa printempo) inspiris lin por ampleksa serio de okdek sep akvareloj pri la dioj kaj herooj el la greka mitologio.

Granda fonto de inspiroj estis ankaŭ la jam menciita verko *Urax*

und Rezabell de Marcel Dornier. Tiu poeta rakonto en heksametroj pri-skribas la « *Leben, Lieben und Leiden* » (vivo, amoj kaj suferoj) de artisto dum la mezepoko en la sudgermana Alpa regiono Algovio (Allgäu). Bedaŭrinde libroeldono kun la okdeko da ilustraĵoj neniam povis realiĝi.

Freskoj kaj vitraloj en Svisio

Jam en Parizo Alfred Gloor efektivegis reklamajn murpentraĵojn por vendejoj. Pere de lia frato Walter

Gloor, kiu estis arkitekto en Svisio, kaj ties asociito Hans Dubach, li povis poste realigi freskojn, sgrafitojn kaj vitralojn en preĝejoj, pa-

roĥejoj, hospitaloj, funebrejoj kaj flegistinejoj (ekzemple Riggisberg, Moutier, Trimbach, Muri, Landiswil, Faulensee).



Kasandro kaj Apolono

Kiu kuraĝas rajdi sur leono ? Nur la homoj, kiuj estas kuraĝaj.

André Cherpillod atentigas nin pri fajna nuanco. (Ĉi tiu artikolo aperos ankaŭ en Heroldo.)

De tempo al tempo, aperas sur la scenejo de Esperanto la jena demando : ĉu oni rajtas senpere verbigi adjektivon ? Alidire, ĉu oni rajtas, el la adjektiva radiko *granda*, fari la verbon *grandi* ? Alidire, ĉu *li grandas* estas perfekta sinonimo de *li estas granda* ?

Le respondo estas : JES kaj NE.

1. Jes, ĉar la Fundamento (§ 7) donas la radikon *kuraĝ'* kiel adjektivan radikon, kaj donas ankaŭ la verbon *kuraĝi* en la frazo *Kiu kuraĝas rajdi sur leono ?* Ankaŭ la paragrafo 42 donas *sani* post la adjektivo *sana*.

Do, sen ia dubo, la pasado de *kuraĝa* al *kuraĝi* estas permesata, ĉar Fundamenta.

2. Ne, ĉar Zamenhof mem (*Lingvaj Respondoj*, n-ro 119) skribis: « *Kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo "esti", tamen ĝis nun ili tiun signifon ne havas.* » Tiu teksto datumas de 1907, sed ŝajnas, ke la situacio ne ŝanĝiĝis de tiu epoko, kiel ni konstatos.

Alivorte, la finaĵo *-as* ne signifas « *estas* ». Same pri la aliaj finaĵoj, evidente. Tio signifas, ke *li amatas* ne estas la preciza ekvivalento de « *li estas amata* ». *La herbo verdas* ne signifas ekzakte « *la herbo estas verda* ».

Kie kuŝas la diferenco? Mi konfesas, ke ĝi ne estas grandega. Sed ĝi ekzistas, ĝi havas efikon, kaj tio estas facile pruvebla.

Ni konsideru la titolon de ĉi tiu artikolo. Ĝi konsistas el du frazoj: la unua entenas « *kuraĝi* », la dua entenas « *esti kuraĝa* ». Nu, ni interŝanĝu la du esprimojn. Ni ricevas: « *Kiu estas kuraĝa rajdi sur leono? nur la homoj, kiuj kuraĝas.* » Tuj ni sentas, ke io lamas en tiu frazo. Post iom da pripenso, ni elkovras, ke en la unua frazo *kuraĝas* signifas ne « *esti kuraĝa* », sed « *esti tiel kuraĝa, ke...* ». Ni kontrolu: « *Kiu estas tiel kuraĝa, ke li rajdus sur leono?* » Tia estas la vera signifo de la unua frazo. Tio estas klara pruvo, ke *kuraĝas* NE signifas « *esti kuraĝa* ».

Konsekvence, oni povas meti la regulon, ke *-as* NE signifas « *esti ...-a* ». Zamenhof sentis tion en 1907, kaj ĉiu ajn esperantouzanto povas senti la samon en 2011, eventuale nekonscie.

Cetere, ĉiu ajn, kiu havas ian literaturan sentemon, komprenas, ke « *la herbo estas verda, la ĉielo estas blua, ŝia robo estis flava ktp.* » estas nur simplaj konstatoj de faktoj, cetere banalaj (ke herbo estas verda kaj ĉielo blua, mirigas neniun). Male, « *la herbo verdas, la ĉielo bluas, ŝia robo flavis ktp.* » elvokas agon faritan de la herbo, de la ĉielo, de la robo. Tio estas normala: en ĉi tiuj tri asertoj, mi uzis po unu verbon, kaj verbo indikas agon, ĉu ne? La herbo faras ion pli viglan, ol esti verda, ĝi *agas* verde, ĝi *agas* cele al fabrikado de verda koloro. La robo ne nur estas flava, sed ĝi *agas* flave, ĝi ĵetas la flavan koloron al la okuloj de la rigardantoj.

Estus vere bedaŭre, se ĉiuj esperantistoj ne sentus tiujn nuancojn.

En iu romano de Johán Valano, mi memoras la frazeton *la junulo belis anĝele*. Ĉu vi ne sentas ĉi tie ion pli fortan, ol la simpla « *la junulo estis bela kiel anĝelo* ». Oni havas la impreson, ke tiu junulo fabrikas anĝelan belecon. Tio estas des pli frapa, ke la dirita junulo jam mortis. Do, eĉ post la morto, li iel fabrikis anĝelan belecon...

Dank' al la simpla verbigo de la adjektivo.

Se ni starigus la malfeliĉan regulon, ke *-as* egalas *estas ...-a*, aŭ ke *-i* egalas *esti ...-a*, tiu delikata nuanco estus definitive forperdita. Kaj tio signifus simplan malriĉigon de la lingvo.

Cetere, tiaj nuancoj pli-malpli ekzistas en la franca lingvo (kaj verŝajne en aliaj). Estus katastrofo, se Esperanto ne kapablus sentigi

nuancon, kiun la franca lingvo kapablas reliefigi. En la franca : « *la ĉielo estas ruĝa* = *le ciel est rouge* », « *la ĉielo ruĝas* = *le ciel rougeoie* ». Evidente, la franca lingvo, kiel ĉiuj etnolingvoj, estas limigita. Ĝi havas specialan vorton por « *ruĝi* » (*rougeoyer*), por « *verdi* » (*verdoyer*), sed neniu verbo, laŭ mia scio, respondas al « *blanki, blui, flavi* » (ekzistas *blanchir, bleuir, jaunir*, kaj ankaŭ *rougir, verdir*, sed kun alia konotacio, ne konsiderenda ĉi tie). Ja ekzistis *blanchoyer* « *blanki* », sed tiu verbo, ankoraŭ citita en la vortaro de *Littré* (1863), estas nuntempe tute eksteruza.

Tio montras, ke Esperanto kapablas montri pli fajnajn nuancojn, ol la franca lingvo, kio supozeble mirigas nenium esperantiston.

Sed oni akceptus, ke *la herbo verdas* havus ekzakte la saman sencon, kiel « *la herbo estas verda* », au ke *li kuraĝas* havus ekzakte la saman sencon, kiel « *li estas kuraĝa* », tio signifus, ke ni senigus nian lingvon je tre fajna nuanco.

Tiun nuancon ni ŝuldas al la simpla verbigo de la adjektivo. Oni apenaŭ povas imagi pli simplan rimendon. Ni ne perdu ĝin.

Kiam la Oriento fascinis

(*rs*) Philippe Suchard estis la fondinto de la ĉokoladfabriko Suchard en Neuchâtel-Serrières. En la jaro 1865 li revenis de vojaĝo tra la Oriento kaj decidis konstrui minareton sur sia domo laŭ persaj kaj otomanaj inspiroj. Tiam estis modo en Eŭropo, kiam oni finkonstruis la Suez-kanalon kaj poste artistoj kiel August Macke, Paul Klee kaj Louis Moilliet faris sian « vojaĝon al Tunizio » en 1914.

La malgranda kiosko sur tegmento kun interne dekoritaj muroj per orientaj motivoj, pluraj turotoj kaj minareto kun dorita kupolo akiris relativan famon dum la diskuto pri la referendumo kontraŭ minaretoj. Tamen ĉi tiu arta konstruaĵo havis neniam religian utilon kaj restis privata ĝis nun. Hodiaŭ ĝi estas sub la protekto de la Ofico pri

historiaj monumentoj, sed longtempe ĝi estis forgesita kaj iam minacis detruo. Dum certa tempo ĝi eĉ servis kiel kuirejo por la laboristoj de la ĉokoladfabriko. Pasia ŝatanto de historiaj monumentoj, Laurent Nebel, aĉetis kaj renovigis ĝin, parte subvenciita de la Kantono kaj de la Konfederacio.



Minareto konstruita en 1865 sur la domo de Philippe Suchard (foto el Vikipedio).



Svisa kalendaro

Vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand
www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Marte

- 7 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 9 : Genève : La Stelo, Ĝenerala Kunveno.
- 15 : Basel : ESB : Karnavala kunveno.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 23 : Basel : ESB : Vizito al Village-Neuf.
- 26 : Lugano : Ĝenerala Asembleo de SES.
- 27 : Lugano : Plua restado kun Mireille Grosjean.

Aprile

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 21-25 : Chaux-de-Fonds : KCE-Seminario.
- 28 : Basel : ESB : Luda kunveno.

Maje

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 4 : Wil : EKW-Kunveno.
- 21 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 26 : Basel : ESB-Kunveno.

Junie

- 18 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 18 : Lausanne : LES : Ekskurso tago.
- 23-26 : Chaux-de-Fonds : KCE-Ateliero.
- 30 : Basel : ESB-Kunveno ĉe Grün.

Julie

- 1 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 14 : Basel : ESB-Festa Kunveno en Francio.

Aŭguste

- 2-7 : Chaux-de-Fonds : KCE : Plurnivela kursaro.
- 8 : Chaux-de-Fonds : KCE : Lingvotesta sesio.
- 9-14 : Chaux-de-Fonds : KCE : Esperantologio.
- 15 : Chaux-de-Fonds : KCE : Lingvotesta sesio.
- 16-20 : Chaux-de-Fonds : KCE : Simpozio.
- 22-26 : Grindelwald : Naturamika Semajno.
- 26 : Basel : ESB: Filma Kunveno.
- 27 : Chaux-de-Fonds : SES-Festotago.
- 28 : Plua restado kun Cl. Gacond en La Sagne

Septembre

- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 7 : Wil : EKW-Kunveno.
- 24 : Lausanne : Kultura Sabato.
- 25 : Lausanne : Kultura turisma programo.
- 25 : Basel : ESB : Ekskurso tago.

OktoBRE

- 3 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 27 : Basel : ESB-Kunveno.

Novembre

- 7 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 24 : Basel : ESB-Kunveno.

Decembre

- 7 : Wil : EKW-Rakledkunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 10 : Basel : ESB : Zamenhofa festo.
- 17 : Lausanne : LES-Zamenhofa festo.

Peto de la redaktoro

Bedaŭrinde la redaktoro kapablas anonci nur tion, kio estis sciigita al li. Tial li petas la asociojn kaj grupojn konigi la okazontaĵojn ne lastminute, sed konsiderante la redaktajn datlimojn, kiuj estas anoncitaj en la kalendaro. Ankaŭ raportoj pri la okazintaĵoj bonvenas.